



NORMANDA ESPERANTO BULTENO

N° 273


Januaro 2019

Dépôt à la Bibliothèque Nationale et au fonds normand de la Médiathèque de Caen

Redaktas : Yves Nicolas, 14 place Laënnec, 14 000 Caen. Tel. 06 44 87 22 48
ivnicolas@sfr.fr Enpaĝigas : Michèle Langeois

Abon-kotizo : 10 €. « Esperanto – Normandie ». C. C. P. 283.40 H Rouen

Kasistino : Sylvie Caron, 44 rue Gustave Lennier. 76600 Le Havre



Desegnaĵo de "cartooning for Peace"

ENHAVO

- Paĝo : Bondeziroj - Kotizo 2019
- Paĝoj 2, 3, 4, 5 : Esperanto 2018 en Normandio
- Paĝo 6 : Legindaĵoj 2019
- Paĝoj 7, 8, 9 : Cherbourg 1934
- Paĝo 10 : Cherbourg 1934 - Niaj arkivoj
- Paĝo 11 : Kvinpetalo - Rete, Telefono, MP3e
- Paĝo 12 : Agendo 2019 - Greziljono



Cotisation 2019 : elle reste fixée à 10€

Pensez-y dès maintenant !

Les frais d'envoi étant très élevés, merci de signaler - si ce n'est déjà fait - si vous voulez recevoir le bulletin uniquement par internet.

tel à Yves : 06 44 87 22 48

Karaj legantoj,
En tiu bulteno, vi legos artikolon pri kiel vivis Esperanto en Normandio dum 2018 kaj vi konstatos kiom vasta estis ĝia uzo ! Ankaŭ en nekutimaj cirkonstancoj nia mirinda lingvo povas doni fortan energion al sia uzantaro. Por tion ilustru, jen foto de du aŭstraj soldatoj en 1916 antaŭ sia militŝirmejo.

Ili baptis ĝin « Hejmo Esperanto ». Malgraŭ la terura buĉado ĉirkaŭ si, ili tiel esprimis sian fidon al la internacia lingvo kaj sendis klaran mesaĝon al la Homaro por retrovi la pacan vojon.

La dekstra sidanto, Julius Glück, post 18 jaroj ludos kurtan sed notindan rolon en la historio de la E-o grupo en Cherbourg kiel atestas pria foto kaj artikolo ene de tiu bulteno.

Ni deziras al vi bonan multflankan, buntan uzon de Esperanto en 2019.

Ke ĝia interna ideo modeste kontribuu al via vivĝuo en nia tro ofte maltrankviliga mondo !

Vivu 2019 !

La Prezidanto



Proksimume 70 esperantistoj aliĝas ĉiujare al nia regiona asocio. Jam de pluraj jaroj, de 25 ĝis 35 el ili ĉeestas la Ĝeneralan Asembleon por kune babili kaj interŝangi kun la eksterlanda invitito kies prelego(j) certe forte kontribuas al la sukceso de tiu tradicia rendevuo.

Ekzistas ankaŭ grupoj kaj regulaj kursoj-renkontiĝoj en Le Havre, Granville-Avranches, Flers kaj Hérouville sed plej multaj el ni « unuope » vivas sian esperantismon en senklubaj vilaĝoj kaj urboj. Ni enketis por scii iom pli pri la konkreta uzo de Esperanto en niaj kvin departementoj dum la dua semestro 2018, kun la espero, ke la spertoj de kelkaj allogos la aliajn por plia esplorado de la multnombraj aspektoj de Esperanto, en 2019.

KURSOJ KAJ STAĜOJ

Rémi Troisgros el Carentan (kiel **Patrice Dufeu** (Le Havre) kaj **Yves Nicolas** (Caen) korektas ekzercojn de lernantoj de la reto « ikurso » (<https://ikurso.esperanto-france.org>).

« *La lernantoj sekvas « Cours en 10 leçons » por komencantoj kaj « Gerda malaperis » por komencintoj kaj progresantoj. Mi helpas de unu ĝis 5 lernantojn. Estas agrable kaj kuraĝige helpi en la lernado de nia komuna lingvo tamen nur 20 % el la komencantoj daŭrigas la studadon post kelkaj lecionoj. Sed novaj demandoj konstante venas* » skribis Rémi.

Ni bone konsciu, ke multaj junuloj interesiĝas pri Esperanto dank'al la retaj kursoj kiel „Duolingo“, „Lernu“ kaj „iKurso“. El tiuj interesitoj, 6 kontaktis la klubon en Hérouville-Saint-Clair aŭ sekvas ĝiajn kursojn. Nicolas, Victorine, Marin, Nathan, Simon, Jean-Loup, plej multaj studentoj, sekvis aŭ sekvas plu retan kurson. Ni intervjuis Marin kaj Jean-Loup.

Marin, 18 jaraĝa, studas historion en la Universitato de Caen. Li informiĝis pri Esperanto per « Youtube Linguisticae » kaj unue sekvis kursojn per “Duolingo” kiu ne tro plaĉis al li. De post aliĝo al la kurso en Hérouville, li regule lernas per « iKurso » kies metodon kaj klarigojn li opinias tre efikaj. Yves, lia instruanto en Hérouville estas ankaŭ lia korektanto en « iKurso ». Marin ankaŭ ŝatas la informojn en ĉiu leciono de « iKurso » pri muziko, literaturo, praktika uzo de Esperanto. La kontakto kun loka grupo por li tre gravas por lingve progresi.

Jean-Loup, tridek tri jaraĝa, laboras en Caen. Per « i-kurso » li sekvis la kurson « Dix leçons » kaj nun la kurson « Gerda Malaperis » kiun korektas Yves. Li partoprenas la kurson de Gigi Sénécal en Hérouville. Por li ambaŭ kursoj (reta kaj kluba) tre utilas. « *Mi bone parolas la anglan sed mi esperas ankaŭ uzi Esperanton kiam mi vojaĝos* », li skribis.

Dum unu semajno en aŭgusto, **Pascal Hébert**, kiu akceptis nian Ĝeneralan Asembleon en L'Aigle en 2018, instruis Ŝogion (japana ŝako) en la fama rekomendinda staĝkastelo Grezijono. Li intencas iĝi fakdelegito pri Ŝogio en la Delegitaro de Universala Esperanto Asocio (delegitoj ankaŭ ekzistas en Le Havre (Sylvie Caron) kaj Caen (Gérard Sénécal kaj Yves Nicolas).

Dum la Itala Kongreso, Gigi Sénécal (instruanto en la klubo de Hérouville) sekvis rondan konversacion de Rafael Mateos Gonzales. Ŝi raportis « *sperta, lerta, vigla, akceptema esperantisto. Ĉiutage li, aŭ partoprenantoj, proponis diskutindan temon. Neniam aŭ preskaŭ neniam Rafael korektis la parolanton. Ne gravas la eraroj, plej gravas la esprimado' diris li. Poste oni diskutis, kritikis. Fojfoje la debatoj plidaŭris post la kurso en koridoroj. Fruktodona sperto por mi kiu emas tuj korekti miajn lernantojn. Eble, eĉ certe, iuj preferus mian korektadon post siaj intervenoj* ».

Dume, **Gérard**, ŝia edzo, sekvis du kursojn de la tre renoma Akademio Internacia de la Sciencoj kiujn gvidis Amri Wandel (Israelo) pri Astronomio kaj Humphrey Tonkin (Usono) pri „Shakespeare sojle de la nova jarcento : Hamleto kaj poste“. « *Aŭ skulti la fluan kaj belan paroladon de Humphrey Tonkin donis al mi senmezuran plezuron* », entuziasme konfirmis **Gérard Sénécal**.



Gérard kaj Gigi dum la itala kongreso

Christian Lévesque malfermis en oktobro novan kurson por 14 homoj en Avranches kie la kantistoj « La Kompanoj », invititaj de nia normanda asocio, faris tre sukcesan koncerton en marto 2018



Nova kurso en Avranches ! Parto de la lernantoj

KORESPONDADO

Korespondado estas ofta, ordinara, logika afero por multaj inter ni, kiuj konatiĝis kun eksterlandanoj okaze de kongresoj, de vojaĝoj, de staĝo. Tiukaze, kreiĝis amikaj rilatoj sur longa periodo. Antaŭe, la interŝanĝoj estis poŝtaj kun la plezuro malfaldi leteron kaj atente rigardi tre ofte belan poŝtmarkon. Nun, oni fulmrapide respondas al retmesaĝoj aŭ interŝanĝas fotojn kaj komentojn per Fejsbuko. « Edukado.net » enhavas rubrikon kun korespondpetoj de homoj el la tuta mondo (<https://edukado.net/komunumo/korespondaservo>)

Philippe Bony, en Coutances, bedaŭras ne plu instrui en lokaj lernejoj sed daŭre korespondas per la reto kun pluraj samideanoj el Usono, Rusio, Germanio kaj Afriko. Tiu korespondado okazas de multaj jaroj kaj teksas fortajn ligojn. « Ni neniam renkontiĝis sed ni estas malnovaj amikoj. Estas vere tre plezure ! » raportas Philippe kaj Odile, lia edzino.

Miŝa Chaplain (Flers) korespondas kun Gobi el Benino, kiu antaŭ nelonge skribis al ŝi « Kiam mi estis 12 jaraĝa, en mezlernejo, mi renkontis Esperanton kun la helpo de angla instruisto. Ĉiun merkredan vesperon ni bonege lernadis tiun belan lingvon. En 2015, mi fariĝis sekretario de la Benina Organizo de la Junaj Esperantistoj kaj nun prizorgas la financojn de la Benina Asocio »

Claude Ferrand (Caen) estas korespondema kun fidelaj amikoj renkontitaj en Japanio, Aŭstralio, Rusio, Israelo, ktp. Kelkajn el ili, li plezure renkontis en Lisbono dum la UK.

KONGRESOJ KAJ VOJAĜOJ

Anne-Marie Leprévost (Flers), **Claude Ferrand** kaj **Marie-Anne Piette** (Caen)

ĉeestis sub arda suno tre belan Universalan Kongreson en **Lisbono**, kiel 1500 aliaj homoj el pli ol 70 landoj.

Brigitte Cottin, **Aline Martin**, **Gérard** kaj **Gigi Sénécal** (el la klubo de Hérouville) elektis la Italian Kongreson en **San Marino**. Kiel skribis Gérard :

« Tiu kongreso estis alloga por ni, ĉar ni preferas malgrandajn aranĝojn por pli facile babiladi kun konatuloj. En San Marino, partoprenis 170 homoj el 29 landoj. Pri la kongreso, piede de la mezepokaj remparoj, ni sentis nin vere same kiel en granda familio. Pro facile retroveblaj partoprenantoj, ni sukcesis paroli, eĉ longe, plurfoje dum la semajno kaj eĉ plurfoje tage kun la samaj personoj, konatuloj aŭ nekonatuloj ».

Brigitte Cottin plezure retrovis germanan amikinson kaj amikiĝis kun greka esperantistino, ĵurnalisto en sia lando. Ŝi kaptis la okazon por


« aĉeti plurajn librojn nekonatajn aŭ famajn ĉar tiel mi riĉigos plu mian Esperanton ».

Okaze de la kongreso en Italio, Gérard kaj Gigi ankaŭ veturis ĝis Parmo kaj poste Arcidoso por pasigi pliajn agrablajn tagojn kun E-o amikoj.

Yves Nicolas partoprenis karavanan vojaĝon en Andaluzio. En Seviljo, atendis lin esperantisto por nokta vizito de tiu bela urbo. Li kontaktis lin per « Pasporta Servo », adresaro por gastigado en kiu vi trovos la nomon de esperantistoj el kelkaj normandaj urboj (en aŭ apud Coutances, Carentan, Rouen, Giverny kaj en Caen kiel la –novbakita esperantisto Christiane Krueger, juna germanino).

LEGADO, AŬSKULTADO, VERKADO

La biblioteko de la klubo en Hérouville enhavas plurajn centojn da libroj je la dispono de sia anaro. Antaŭ nelonge, ĝi akiris la ĵus esperantigitan verkon « *Ordre du jour* » (Tagordo) de Eric Vuillard, premio Goncourt 2017. Mendu ĝin, kaj multajn tre interesajn librojn por la plezuro legi, riĉigi sian Esperanton, helpi verkistojn kaj E-o eldonejojn (deSAT-Amikaro, Esperanto-France, de UEA, « Flandra Esperanto Ligo », « Mondial », ktp).



Estas konate, ke tro da esperantistoj tre malmulte legas e-o verkojn. Pri tio, Claude Ferrand kaj Marie-Anne Piette (Caen) raportis amuzan kanonon de la fama grupo „Kajto“ kies kantan atelerion ili sekvis dum UK en Lisbono :

*La libroj estas bona societo
Kaj tamen kelkaj plendas,
Ke ili ĉiam sur sia breto
La dorsojn nur prezentas*

Marcel Lemeltier (Pastro Mark) el Bricquebec legis « La vivo de Cseh » de E. Borsboom. « Mi ankaŭ tra legis la tradukon de 'Ekspedicio Kon-Tiki », aventuro kiu ĝojigis mian junaĝon ». Marcel Lemeltier verkis longan artikolon

« Ĉu Lanti reenkariniĝis en Israelo ? » :

« *Temas pri tiklaj pensoj kiuj naskiĝis okaze de romano 'Judas' de la fama israela verkisto Amos Oz.*

Pri Lanti, mi nun finpretigas analizon pri liaj japanaj jaroj. Krome mi klopodas vivi la reton « Esperanto Cotentin».*

En novembro 2011, prelegis Pastro Mark pri Lanti Klubo de Hérouville-Saint- Clair

Pascal Hébert (L'Aigle) esperantigis fabelojn de la poeto-rakontisto Mario Urbanet, kies verkojn eldonas la eldonejo « Serpolet » sub la titolo « Kvin fabeloj por provi ŝanĝi la mondon ».

Rémi Troisgros ŝatas aŭskulti radioelsendojn kiuj multas en esperanto el Ĉinio, Pollando, Kubo kaj alie. Ni aldonu la tre bonajn « Muzaiko » kaj « Kern.punkto ».

Pluraj homoj ankaŭ regule legas la revuojn « Monato », « Esperanto », « Kontakto », « La Sago », « Sennacieca Revuo », « Sezonoj », « Espéranto-Info » « La ondo de Esperanto », ktp, ktp, aŭ abonas la legindan « Beletra Almanako ». legindan « Beletra Almanako ».

Vidu kiel multaspektas la uzo de Esperanto en Normandio ! Tre certe, pluraj el vi kiuj ne respondis por tiu sinteza raporto esploris aliajn vojojn kaj ĝuis belajn momentojn en tre konataj aŭ modestaj ejoj kaj en kaŝitaj ujoj de la tutmonda kaj bunta Esperantio.

Karaj emuloj al vojaĝoj, kongresoj, legado, korespondado, aŭskultado, verkado, ni deziras al vi belajn aventurojn en **2019** !

*Aliaj normandaj retpaĝoj : la blogo de Hérouville-Espéranto kaj la Facebook paĝo

« Lehavreesperanto » (aktualigas ĝin Bernard Dufresne)

Libroservo de LKK

Krom-KancerKliniko

3. Bruoj kaj ludoj, Manceau, Saletti, Bertil	2,75 €
4. Stilekzercoj, R. Queneau/I. Ertl, nova eldono, A5	5,00 €
5. La Majstro kaj Margareta, Bulgakov/Long	3,00 €
7. Pala Fajro, Nabokov/Meva Maron	3,00 €
8. Letero el Palestino, Alba/Kamaĉo	3,00 €
9. Hura-A-A-A, Daniil Harms/Natan Procenko	3,35 €
10. Pro kio Esperanto? Koresponda debato	3,70 €
11. La Orelringo, de Jopetro Danvy	3,70 €
12. La ĉapo de la sterko-vermo, G. Kamaĉo	3,80 €
13. Kulturo : valoro aŭ varo? Kongresa temo '96	3,80 €
14. Sanĝado, poemaro de Mao Zifu	3,80 €
15. Ĉi-semajne, eĉ ajn-mise, S. MacGill	3,80 €
16. Arnau - Kavlan - Septier - Sire	4,00 €
17. Elpensajtoj/tradukoj de Bruna Ŝtono	4,00 €
18. Alilingvaj erotikaj poeziaĵoj, GWaringhien	4,00 €
19. Trad. de C. Gerlat (Pavloff, Sfar, Yourcenar...)	4,00 €
20. Trilingva landlim', Peter BroWne	4,40 €
21. Ekzile, noveloj de Mircea Eliade, trad. I. Onet	4,40 €
22. Ĉu nur unu civilizacio?, Manuel de Seabra	4,40 €
23. Senfrokiĝinto, Šarlerik d'Arroi	4,40 €
24. Rip VanWinkle, W. Irving, trad. I. Onet	5,00 €
25. Esperanto-identeco, Anatolo Gonĉarov	5,00 €
26. Arto, Jasmina Reza, trad ILO, teatraĵo	5,00 €
27. Kapitalismo, lasta akto, Sen Rodin	5,00 €
28. Gaston Couté, poemoj, noveloj, teatraĵoj	6,00 €
29. E. Ionescu, La angla sen instruisto, trad. I. Onet	5,50 €
30. Bleko de blua anaso, A. Vialatte, trad. Š. d'Arroi	5,50 €

Diversaĵoj

GeLKKpoetoj, LeQuint/Le Puil	3,00 €
Knedu min Sinjorino, R. Corsetti, nova eld. A5	5,00 €
Momo, Kavlan x 2, bildrak., 48-p-a (Rab.)	5,00 €
KD : Sen elizi', Jak Le Puil	15,00 €
KD : Mi estas... Jak Le Puil	18,00 €

Libroj (sen rabato por "Vojaĝo", "Songoj", BoRoKo)

BoRoKo, Serĝo Sir'	15,00 €
Varma Mezepoko, Serĝo Sir'	12,00 €
Perverse, Serĝo Sir'	12,00 €
La RejnOro, S. Sir' G. Lagranj'	12,00 €
Florville kaj Courval, Sade/LeQuint-Le Puil	5,00 €
Higieno de l' murdisto, A. Nothomb/LQ/LP	9,00 €
Infantravivaĵoj, Armela LeQuint	4,00 €
Kormoranoj (la), N.Gion/L.Huszar	6,00 €
La leciono, E. Ionescu/LeQuint-Le Puil	6,50 €
La minuto preskribita..., J. Leroy/LeQuint/Le Puil	17,00 €
La pensemaj kokinoj, L. Malerba/J. Le Puil	2,50 €
Pluralogo, de Vimala Devi	7,00 €
Promeso en obskuro, M. de Seabra. Noveloj	10,00 €
Rakontoj pri Sarajeva Sieĝo, Zlatko Dizdarević	6,00 €
Speguligoj, de Vimala Devi	4,00 €
Songoj de kristalo, J. Leroy/LeQuint-Le Puil	5,00 €
Vojaĝo ĝis noktofino, Céline/LeQuint-Le Puil	24,00 €

« La Kancerkliniko », Jacques Le Puil,
Chemin du Cocherat, 18210 Thaumiers

AMIKA VOJAĜO EN ALZACO

Tre ofte esperanto kurso kreas amikajn ligojn inter siaj lernantoj, des pli se tiuj lernantoj kune partoprenis E-o aranĝon aŭ vojaĝon. Tiel okazis por klubanoj el Hérouville-Saint-Clair kiuj, post memorinda esperantista vojaĝo en Rusio (Sankta-Peterburgo kaj Tiĥvino) decidis denove kune vojaĝi. En aŭtuno 2018, Francine kaj Jean-Marie Fortin, Brigitte kaj Pierre Cottin, Marie-Anne Piette kaj Claude Ferrand, luprenis komunajn aŭtomobilon kaj restadejon por viziti Alzacon kies famaj nomoj kiel Colmar, Strasbourg, Haut-Koenigsbourg, Kayserberg, la « Monto de la Simioj », Eguisheim kaj aliaj, tre allogis ilin. En decembro, ili raportis pri tiu bela vojaĝo al la aliaj klubanoj dum la ĉiumarda kurso. Post prezento de interesaj bildoj kaj multaj anekdotoj, la sesopo regalis la ĉeestantojn per bongustaj alzacaj vinoj kaj aliaj dolĉaĵoj.



Marie-Anne Francine Brigitte
Claude Jean-Marie Pierre

ARTOJ kaj ESPERANTO

DU JAPANINOJ VIZITIS LA DOMON KAJ ĜARDENOJN DE MONET

Gigi kaj Gérard Sénécal plurfoje vizitis Japanion kaj antaŭ kelkaj jaroj tien organizis plursemajnan vojaĝon kun klubanoj el Hérouville. Konsekvence kreigis fortaj amikaj rilatoj kaj reciprokaj gastigadoj



kiujn kelkfoje raportis nia bulteno. Pasintan someron, Gigi kaj Gérard gastigis du japaninojn, FUJIMOTO Hideko kaj SAIKI Masayo. Michelle Paumier kaj Jean-Pierre Sauvage, iun tagon, akompanis ilin ĝis Giverny por viziti la ĝardenon kaj domon de Claude Monet.

Hideko kaj Masayo ege ĝuis tiun viziton ĉar la pentraĵoj de Monet tre famas en Japanio. La artisto vivis dum 43 jaroj en la domo de Giverny. Li grandigis ĝin por akcepti sian grandan familion, multajn gastojn kaj dungitaron. Vizitindas la garbejo-ateliero, la « Blua salono » kun de li kolektitaj japanaj stampbildoj, la nutraĵejo kun bambuaj mebloj

en tiama furora japaneska stilo, la blufarba kuirejo kun kahelaroj de Rouen, la dormoĉambro kie Monet mortis la 5an de decembro 1926.

Michelle Paumier, tre sperta priarta ĉiĉerono, riĉigis la viziton per multaj informoj pri la artisto kaj liaj verkoj dum la vizito de la tutmonde konataj ĝardenoj. La flora ĝardeno « Clos Normand » dividiĝas en bedoj kies floraj masivoj kreas buntajn kaj diversaltajn volumojn. La « Akva Ĝardeno », japane inspirita, kaptis la atenton de Hideko kaj Masayo. Monet imitis la japanajn ĝardenojn danke al multaj stampbildoj. Li ornamis la akvon per nufaroj kaj nimfeoj kaj ĉarma ponteto sur kiu li ofte restadis por pentri. Oni nombras 45 versiojn de la Japana Ponto kaj la Nimfeojn en Orangerie ricevas de multaj jaroj senĉesan sukceson.

Jen bela promenadcelo kun viaj eksterlandaj amikoj.

fotoj de M.Paumier

Jean-Pierre inter Hideko kaj Masayo



LEGINDAĴOJ EN 2019

Abundas legindaj libroj en Esperanto, ĉu tradukitaj, ĉu originalaj. Kuraĝaj eldonistoj kaj fervoraj verkistoj de pli ol unu jarcento senĉese riĉigas nian internacian kulturon per valoraj romanoj, enketoj, eseoj. Ni invitas vin viziti la retpaĝojn de « Sat-Amikaro », « Esperanto France », « Flandra Esperanto Ligo », « Universala Esperanto Asocio », « Mondial Novjorko », kaj de multaj aliaj por mendi librojn laŭ via gusto. Aŭ kaptu la okazon de vizitata E-o aranĝo por plenigi vian sakon en ĝia «Libroservo» por ne pagi sendokostojn.

Ĵak Le Puil redaktas la konatan revuon « La Kancerkliniko » kaj regule eldonas librojn en la serio « Kromkancerkliniko » kies liston vi povas legi sur alia paĝo de tiu bulteno. Verkoj de altnivelaj verkistoj, esperantistaj aŭ ne, estas aĉeteblaj po tre malalta prezo. La tradukoj de « La Balo » de Irène Némirovsky kaj « Nekonata Adresito » de Kressman Taylor estas aparte rekomendindaj.

LA BALO. Irène Némirovsky. Traduko de Janine Dumoulin. 30 paĝoj La Kancerkliniko n° 31, 2016. 5,50 €

Irène Némirovsky naskiĝis en Kievo en 1903 kaj estis murdita en Aŭŝvico en 1942. Kiam la familio instaligis en Parizo, ŝi lernis la francan literaturon kaj rapide fariĝis sukcesa verkisto.

Janine Dumoulin estris la E-o grupon de Montendre (Charente Maritime) por atingi tre bonan tradukon de tiu kurta romano de ankoraŭ juna verkisto. « La Balo » akre prezentas la burĝaron en la intermilita epoko,

kaj la doloran transiron, fare de la ĉefrolulino, de infanaĝo al iaspeca matureco. La romaneto karakteriĝas per vigla, eĉ morda stilo.

NEKONATA ADRESITO. Kathrine Kressmann Taylor. Traduko de Claude Gerlat. 35 paĝoj. La Kancerkliniko n° 33, 2018. 5,50 €

Tiu romano de Kressmann Taylor aperis en la franca lingvo en 2000 sub la titolo „Inconnu à cette adresse“ kaj tre sukcesis. Verkite en 1938, la verko prezentas la perleteran korespondadon de Martin Schulse, germano kaj de Max Eisenstein, usona judo sed germanie devena. Ili havas komercajn rilatojn kaj de sia junaĝo profundan amikan rilaton. La korespondado ekas en 1932. Unue amika ĝi baldaŭ evoluas

al vidpunktoj radikale malsamaj pro la evoluo mem de la nazia reĝimo. Claude Gerlat tre lerte tradukis la verkon, laŭ la angla originalo « Address Unknown », kiel jam atestas la tre belan tradukon de la titolo :

« Nekonata Adresito ».


ESPERANTO (el INTER AMIKOJ). Amos Oz. 23 paĝoj. Traduko de Gian Piero Savio kaj Amri Wandel. Esperanto Ligo en Israelo, 2015. (La libro kostis 4,50 € ĉe la libroservo de UK en Lille. Pri la nuna prezo, kontaktu : www.esperanto.org.il)

Amos Oz estas verŝajne la plej elstara kaj internacie konata nuntempa verkisto en Israelo. Liaj verkoj tradukiĝis en 42 lingvojn. Li ankaŭ estas konata kiel apoganto de sendependa lando por la palestinanoj.

Li mortis en decembro 2018.

« Inter amikoj » okazas en la fantazia kibuco « Jikhat » je la fino de la kvindekaj jaroj kiam la originala idealismo de la pionira epoko iom

post iom malaperas. En unu el la noveloj, « Esperanto », la verkisto rakontas la morton de Marteno Valenberg, la lasta idealisto. Amri Wandel, tre konata esperantisto, renkontis Amos Oz okaze de tiu traduko.



1934 : UNE BELLE ANNEE POUR LES ESPERANTISTES DE CHERBOURG



Le 16 février 1934, cinquante personnes se rassemblent pour une photo de groupe pour conclure un évènement exceptionnel dans la vie du mouvement espérantiste cherbourgeois. Souriants, pour la plupart jeunes adultes dont un tiers de femmes, et quelques enfants, ils laissent à la postérité l'image d'un groupe joyeux concluant trois semaines intenses d'activités régulièrement relatées par la presse locale, notamment « Le Cherbourg Eclair » très ouvert à l'expression des groupes espérantistes et idistes. Dans le dossier qui suit, nous tenterons de replacer ce cours d'espéranto dans son contexte historique tout en retraçant le destin parfois tragique des quelques personnages que nous avons pu identifier.

Le groupe espérantiste de Cherbourg est créé le 28 novembre 1905 à l'initiative d'un instituteur, Isidore Delahaye. « Les dames sont admises ainsi que les militaires autorisés à s'inscrire », précise le quotidien « Le Cherbourg Eclair » du même jour. Une grande partie de ses membres optant pour l'IDO en octobre 1909, le groupe resté fidèle au Fundamento se reconstitue le 3 novembre de la même année sous la présidence du Docteur Le Duigou qui dirigera la délégation, le 4 août 1910, pour

accueillir au port de Cherbourg L. L. Zamenhof en partance pour le 6^e congrès universel de Washington.

Mis en sommeil pendant la Première Guerre Mondiale, puis fortement concurrencé par le mouvement idiste local jusqu'à la fin des années 20, l'espéranto ne retrouve une activité de groupe qu'à partir du 3 décembre 1932. Mais, sous l'impulsion du Docteur Le Duigou et de Francis Macé, inspecteur de police, l'espéranto cherbourgeois vit alors ses plus belles années.

Le groupe mène une activité locale importante (« Cherbourg est un des plus forts groupes de Normandie » prétend « Le Cherbourg Eclair ») et reçoit, notamment en octobre 1933, plusieurs centaines de demandes de correspondance d'espérantistes de nombreux pays... dont celle d'un instituteur de 62 ans de Potsdam commençant sa lettre par un vigoureux « Heil Hitler » !

Francis Macé parvient à faire venir, dans le cadre d'une tournée nationale, Julius Glück, très connu pour ses nombreux cours dispensés en Autriche, Tchécoslovaquie, Pologne, Allemagne et France. Le cours, selon la Méthode Cseh, de 15 leçons à partir du 20 janvier 1934 remporte un très grand succès. Selon « Franca Esperantisto » de février 1934, 36 élèves participent au premier cours, 59 au second et 70 au troisième. La présence de Julius Glück donne l'occasion d'une conférence espérantiste le 24 janvier devant 150 personnes dont « une jeunesse nombreuse ». Puis Glück fait une conférence sur Prague le 7 février et, le surlendemain, une autre sur la valeur pédagogique de l'espéranto. Pour fêter son départ, « au nom de tous les élèves, les plus jeunes élèves Mlle Lainé et Mr Duval, lui offrent le 11 février un magnifique stylographe et stylomine. Mme Macé, qui fut une très fidèle collaboratrice de Mr Glück, reçoit une gerbe de fleurs » et l'assemblée ne manque pas d'entonner « tous les élèves debout » « La Espero ».

Glück prolonge son séjour au moins jusqu'au 16 février, comme l'atteste le panneau de la photo de groupe présentée dans cette article. Durant les mois suivants, le groupe continuera de suivre par voie de presse ses conférences à Tours, Rouen, Dunkerque.

Toutefois, le groupe semble avoir cessé ses activités peu après sans qu'on en sache la raison. Selon le bulletin régional de juin 1935, il est reconstitué par Mr Vincent, ingénieur, sous le nom « Les amis de l'Espéranto » (trésorier : Mr Lecarpentier ; secrétaire : Mr Bameille) et revendique sa neutralité politique. Le « Cherbourg Eclair » signale dans son édition du 3 juillet 1935 une séance d'étude de la langue au sein du groupe « Les espérantistes communistes » et dans des numéros à partir d'octobre de la même année des cours à la Maison du Peuple du groupe « Espéranto SFIO » d'Equeurdreville. Faut-il distinguer ce dernier du « groupe espérantiste socialiste » dont il est plusieurs fois également question en 1936 ? Toujours est-il que

l'activité espérantiste se disperse en plusieurs groupes d'affinités politiques différentes qu'influence l'actualité nationale et internationale. Un enseignant, Mr Metz, participe avec enthousiasme au congrès universel de Rome en 1935 (C-E du 6/10/1935). Il rapporte de l'Italie fasciste le commentaire suivant : « Deux mille personnes animées par la même foi marchant vers le même idéal : la paix universelle par l'entente des peuples entre eux. Dans chaque grande ville italienne (...) les espérantistes ont été accueillis par des paroles enthousiastes, choyés, fêtés et gâtés. (...) Ce voyage a été comme un rêve, comme une féerie magnifique ». Les groupes communiste et socialiste(s) semblent avoir cessé leur activité avant ou dès 1937 car aucun communiqué de leur part paraît dès lors dans « Cherbourg-Eclair ». Plusieurs de leurs membres s'engagent alors notamment dans des comités anti-fascistes ou des activités politiques liées au Front Populaire. Le groupe « Les amis de l'espéranto », politiquement neutre, continue ses activités au moins jusqu'en 1939 avec une douzaine de membres réglant une cotisation à la fédération normande. En 1941 et 1942, un espérantiste publie, sous le nom de Serge Simans, plusieurs articles en faveur de l'espéranto dans la rubrique « Les idées de nos lecteurs » du « Cherbourg-Eclair ». Nous avons retenu celui du 18 août 1942 au titre évocateur : « L'espéranto et la collaboration européenne ». C'est justement cette collaboration durant l'occupation nazie qui vaudra au « Cherbourg Eclair » d'être interdit de publication dès juin 1944.

i.GREKEN

Sources :

- Le quotidien « Le Cherbourg Eclair »
- Le site « Esperanto-Cotentin » animée par notre ami Marcel Lemeltier
- Franca Esperantisto de l'époque
- Vikipedio et Wikimanche
- « Normanda Stelo », 1908-1914 et « Bulletin de la Fédération Espérantiste de Normandie » 1933-1940, récemment retrouvé par Pierre Lemarchand
- Archives de l'association normande d'espéranto
- Echange internet avec Mr Jean-Claude Defrance, le 9 mai 2016
- « Stelsemantoj en la ora nordo. Tiberio Morariu kaj liaj samtempuloj » de Katalin Kováts.

Julius Glück

Né en 1877 à Duschnbik en Autriche-Hongrie (aujourd'hui Daleke, République Tchèque), il est ingénieur et officier dans l'armée autrichienne durant la Première Guerre mondiale. J. Glück apprend l'espéranto en 1907 et dès cet instant dédie une grande partie de sa vie à la diffusion de la langue internationale. Enseignant et propagandiste infatigable et renommé, il séjourne dans plusieurs pays d'Europe pour dispenser des cours comme d'autres conférenciers de cette époque très féconde : Andreo Cseh, Lidia Zamenhof ou Tiberio Morariu. Il intervient dans de nombreuses rencontres internationales et collabore régulièrement avec les plus grandes revues et maisons d'édition en espéranto.



René Schmitt (1907-1968)

René et Lucille Schmitt

Fils d'instituteurs alsaciens, René Schmitt devient militant socialiste dès ses années de lycée (Louis-le-Grand à Paris). Diplômé d'études supérieures d'allemand à la Sorbonne, il est affecté au Lycée Victor-Guignard de Cherbourg en 1932. Sa femme, Lucille Costil est également enseignante. Très impliqué dans la fédération départementale socialiste, il est initié à la loge maçonnique « L'Humanité » de Lisieux le 14 janvier 1934, c'est-à-dire un mois avant la photo espérantiste présentée dans cet article.



Fait prisonnier et envoyé en Allemagne en 1940, il est de retour à Cherbourg où il est co-fondateur en juillet 42 de la section départementale du réseau de résistance « Libé-Nord ». Arrêté par la Gestapo le 5 juillet 1943, il est libéré de Fresnes, faute de preuves, en janvier 1944. R. Schmitt est nommé par le préfet à la tête de Cherbourg en octobre 1944. De forte personnalité et indépendant dans ses jugements, il sera, entre autres, à deux reprises maire de Cherbourg et député.

Pierre Rouxel

Instituteur originaire de Nouainville. Il épouse Marie, veuve de Jules Munsch « tué à l'ennemi » en 1915 dont elle avait un enfant, Juliette. Juliette deviendra la femme d'André Defrance. Le couple pacifiste prend en 1922 position pour le Parti communiste récemment créé et s'active particulièrement à Equeurdreville. Il soutient également Blanche Maupas pour la réhabilitation de son mari fusillé pour l'exemple le 17 mars 1915. Pierre Rouxel a aussi des responsabilités au sein du syndicat SNI. En raison de leurs activités militantes, Marie et Pierre Rouxel sont éloignés dans le sud de la Manche mais sont réintégrés dans leur poste d'Equeurdreville dans les années 30 où ils animent des comités antifascistes de la région (Mouvement Amsterdam-Pleyel, Pionniers antifascistes).



André Defrance (1908-1952)

Embauché comme chaudronnier à l'arsenal de Cherbourg en 1926, il y devient secrétaire du syndicat CGTU. Mobilisé, il fait la campagne de 1939-1940 et à son retour, s'engage rapidement dans les mouvements de résistance en créant des groupes de patriotes sous l'égide du Parti Communiste. Il entre dans la clandestinité en mai 1941 à la suite d'une grève au camp d'aviation de Gonnevill-Maupertus et mène par la suite de nombreux combats dans diverses régions de France. Juliette, sa femme, est, elle, emprisonnée durant trois ans dans les camps vichystes. André Defrance, jamais remis de sa déportation, meurt prématurément en 1952.



Jean Defrance

Frère d'André



Bustes des résistants communistes Juliette et d'André Defrance à Equeurdreville-Hainneville par X. Gonzalès





Le Docteur Le Duigou et Francis Macé

Nous n'avons pas trouvé leur photo sur les pages d'internet mais nous émettons l'hypothèse qu'ils entourent Julius Glück sur la photo de groupe.

L'homme âgé à sa droite, serait le Docteur Le Duigou. Né en 1871, il est un temps conseiller municipal (au moins en 1904) et a une longue carrière de médecin à Cherbourg qu'il quitte en septembre 1936. La « chronique familiale des Le Duigou » consultée sur internet indique qu'il serait mort à Paris en 1949 et serait inhumé au cimetière de Baugé, commune du Maine-et-Loire où se dresse fièrement le château de Grésillon connu pour ses excellents



cours d'espéranto depuis les années 50. Parmi les premiers animateurs du groupe espérantiste, le Dr Le Duigou restera un opposant déterminé à la scission idiste sur Cherbourg.

Francis Macé serait à la gauche de J. Glück en sa qualité d'organisateur de cet événement et de responsable du groupe. Inspecteur de police, trésorier de l'« Amicale des Fonctionnaires Espérantistes de la Police de France et des Colonies », il est d'abord militant idiste dans les années 1920. Puis, l'un des principaux animateurs du groupe espérantiste refondé au début des années 1930. Cependant dans son numéro de février 1935, le bulletin normand écrit « par deux fois, en novembre et en janvier, nous avons écrit au Président Macé. Nos demandes sont restées sans réponse et nous en ignorons la cause ». En effet, à partir de cette date, F. Macé semble avoir cessé ses activités espérantistes dans les groupes cherbourgeois, pour une raison inconnue.

Auschwitz

Comment André Defrance et Julius Glück, respectivement élève et professeur du cours d'espéranto de février 1934 à Cherbourg, auraient-ils pu imaginer que leurs destins passeraient, durant la décennie suivante, par le camp de déportation et d'extermination d'Auschwitz ?

André Defrance, militant communiste et acteur important de la résistance, y est tatoué sous le matricule 185396 en avril 1944, avant d'être envoyé à Buchenwald puis Flossenbourg. Il s'évade lors de la « Marche de la Mort » dans la nuit du 25 au 26 avril 1945. Il se remet difficilement de ces épreuves et meurt prématurément en 1952.

Julius Glück fuit l'Allemagne nazie dès 1933 pour se réfugier à Paris puis en Hollande où il est arrêté le 1er septembre 1942. Il est tué à Auschwitz le 7 septembre 1942.

NIAJ ARKIVOJ

Pierre Lemarchand (Rouen) bonŝance retrovis en sia subtegmento gravajn arkivojn el la tridekaj jaroj. Transdonis al li antaŭ multaj jaroj S-ro Jouis, tiama tre aktiva estro de la normanda federacio. Temas pri kvazaŭ ĉiuj bultenoj de septembro 1933 ĝis marto 1940. Pierre Lemarchand ankaŭ retrovis diversajn notojn pri tiu epoko kiuj donas interesajn informojn pri la vivo de la lokaj kluboj.

Eble kuŝas en via propra subtegmento, aŭ en forgesita kofreto en via kelo, tia « trezoro » kiuj utilus por kompletigi la historion de nia regiona movado. Bonvolu ilin sendi (aŭ fari kopion) al Yves Nicolas kiu, post esploro, deponos ilin ĉu en la Nacian Bibliotekon ĉu en la Mediatekon de Caen. Vi ankaŭ povas deponi tiujn dokumentojn en viajn lokajn aŭ departementajn arkivejojn (tiukaze bonvolu nin informi).



«Kvinpetalo », en Bouresse, organizas staĝon de la 25a de februaro ĝis la 1a de marto pri :

« Kio komuna inter tiuj libroj ? »

– « Ne ekzistas verdaj steloj », de Liven Dek

– « Viktimoj », de Julio Baghy

– « La Zamenhof strato », de Roman Dobrzyński

– « La bona lingvo », de Claude Piron

Divenu...kaj venu!

Pliaj informoj ĉe : Claude Nourmont : « moonmont@pt.lu »

RETE, TELEFONE, MP3-e, NOVAJ ILOJ POR PLIA UZO DE ESPERANTO !!!



Amikumu, application mobile pour rencontrer des espérantophones proches de soi, partout dans le monde. Elle permet :

- de trouver des espérantophones autour de soi,
- de consulter des profils et de s'exprimer,
- de faire connaissance et de se rencontrer.



Vinilkosmo proponas multajn KD de esperantistaj kantistoj



Streĉu la orelojn !

Tre interesaj sondosieroj



Aliaj retadresoj de radioj (laŭ «La Tero », praktika enciklopedio de « MONATO », internacia magazino sendependa, eldonata de Flandra Esperanto Ligo):

Radio Vatikana : <http://eo.radiovaticana.va/>


Ĉina Radio Internacia : https://eo.wikipedia.org/wiki/%C488ina_Radio_Internacia

Pola Radio : pola-retransmisio.org

Radio 3ZZZ Melburno (Aŭstralio) : <http://www.esperanto.com.au/3zzz-esperanto-radio>

Radio Havano : <http://radiohc.cu/eo/interesantes/frecuencias>

Ligiloj al aktivaj radio-stacioj en Esperanto : <http://novajhoj.weebly.com/>



NOTEZ DES MAINTENANT DANS VOTRE AGENDA

L'Assemblée Générale normande aura lieu le samedi 18 mai 2019 à Equemauville, près de Honfleur.

Ne manquez pas ce rendez-vous traditionnel ! Après le beau succès de L'Aigle en 2018, nous nous retrouverons cette fois dans une commune proche d'Honfleur, Equemauville, où nous bénéficierons de très bonnes conditions d'accueil. Nous nous réunirons dans une salle publique confortable attenante à l'école municipale «Les reinettes » et mangerons dans un réfectoire à quelques pas de là.

La partie culturelle de notre rendez-vous, devrait être assurée par Dominika et Georgo **Handzik**, chanteurs polonais, dont le spectacle a remporté un franc succès pendant le Congrès Universel de Lisbonne de 2018. Ils seront alors en France pour une tournée nationale.

Nous ne manquerons pas de visiter, dans l'après-midi, les plus belles rues d'Honfleur dont la renommée n'est plus à faire.

Le programme complet de la journée vous sera présenté dans le bulletin du mois d'avril, mais cochez dès maintenant la date du 18 mai dans votre agenda !

Sylva Gondoin, espérantiste de l'étape et
Véronique Coutelle, maire-adjointe



Visite touristique d'automne : à Carentan le samedi 5 octobre 2019

Rémi Troisgros, espérantiste local, nous accueillera à Carentan. Souvent méconnue des normands, cette petite ville mérite le détour. Rémi, qui travaille à l'Office National des Forêts, pourra également nous accompagner dans les marais à la porte de la ville pour une découverte de la faune et de la flore de ce milieu naturel typique. Notez dès aujourd'hui dans votre agenda, à la date du 5 octobre « ne pas oublier mes jumelles et mes bottes » !

Un espérantiste croate en tournée en Normandie en février 2019

Alan Neven KOVACIC est un guide touristique et interprète dans plusieurs langues.

Il habite à Zagreb et fait à partir du 15 janvier une tournée dans une vingtaine de clubs espérantistes de Belgique et de France pour animer des cours de conversation mais aussi pour parler de l'histoire et des cultures de son pays et de l'ex-Yougoslavie. Sa présence en Normandie est prévue du 5 au 9 février avec, notamment, une intervention à Avranches et à Caen et quelques visites touristiques. Le programme précis sera connu à la fin du mois de janvier.

Nous vous invitons à prendre contact avec **Christian Lévesque** pour Avranches (lesleveque@wanadoo.fr ; 02 33 91 75 08) et **Yves Nicolas** pour Caen (ivnicolas@sfr.fr ; 06 44 87 22 48) pour plus de précisions. Ne manquez pas cette occasion de parler avec un espérantiste très expérimenté et pédagogue !



KULTURDOMO DE ESPERANTO – KASTELO DE GREZILJONO

Saint-Martin d'Arcé, 49 150 Baugé en Anjou. Kontakto :
kastelo@gresillon.org.

PRINTEMPS

Cours intensifs et examens 2019

Cours : du 26 avril au 4 mai

Examens : du 3 au 4 mai

Informations : « gresillon.org/aligho » ; 02 41 89 10 34

